

Simon Dach,
Anjo de Tharaŭ

tradukita de Ludwig Emil Meier

Anjo de Taraŭ plaĉegas al mi,
Monon kaj vivon mi donus por ŝi;
Anjo de Taraŭ en ĝoj' kaj dolor',
Min rekompencas per propra la kor',
Anjo de Taraŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Eĉ se minacus la mondo-ruin',
Tamen neniel forlasus ni nin:
Ĉar en danĝero, turmento, ĉagren'
Amon firmigas ĉiela la ben'.
Anjo de Taraŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Kiel altiĝas palm-arba tegment'
Post batala do je pluvo kaj vent',
Tiel kreskadas de l'amo la fort'
Per suferado kaj moko de l'sort'.
Anjo de Taraŭ, vi mia anim',
Ĝojo de l'vivo kaj ĉarmo sen lim'!

Se vi disiĝus nevole de mi,
Kien ne vagas eĉ sunoradi',
Mi vin sekvadus trans montoj kaj mar',
Spite mizero kaj malamikar'.
Anjo de Taraŭ, vi rava sunbril',
Paco de l'vivo, de l'koro azil'!

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

...

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

*Traduko de la Germana poemo “Ännchen von Tharau” de Simon Dach en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919).*

Arg-1034-2098 (2014-05-31 12:29:43)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en http://kantaro.ikso.net/anjo_de_tarau.